

ESPERANTISTO

ESPERANTYSTA POLSKI

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO KAJ EKSTERLANDE
MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE I ZAGRANICĄ

ELDONANTO
WYDAWCA

POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO.

REDAKTANTOJ PROF. DR. ODO BUJWID — TAD. HODAKOWSKI
REDAKTORZY

APERAS LA 1-an DE CIU MONATO. REDAKCIAN MATERIALON ONI PETAS SENDI
GIS LA 20-a DE CIU MONATO.

L A L A S T A . . .

DRO LEONO ZAMENHOF IN MEMORIAM.

La lasta frato de nia Majstro ne plu estas inter ni!

Angina pectoris!

La samaj vortoj! La sama sorto!

Ankoraŭ ne preterpasis la eĥo post la morto de Felikso. Ankoraŭ la modo ne sukcesis alĉuti al la penso pri la manko de Felikso. Ankoraŭ la familio ne paciĝis post la terura sortbato al ilia frato, kiam pli kruela tondro surdigis la jam malnoviĝantan doloron kaj kaŭzis tute novan. Kaj liom pli grandan, ke Leono estis per 7 jaroj pli juna.

La lasta kolono de la plej nobla fratara estas dehakita

La fiero de Kongresoj, la apogo de la pola Esperantistaro, la mond fama dignulo Leono Zamenhof ne vivas plu.

La Apostolo de la „Interna Ideo”, la

La senkompata „Angina pectoris” abrupte forŝiris de ni plej altaspiran Kavaliron, plej bonan Esperantiston,

plej ageman Samideanon, plej utilan L. K.-anon. Al malfeliĉaj infanoj kaj edzino ekmankis subite la plej sindona patro kaj edzo. La suferantaj pacientoj ne plu ricevos helpon de la oferplena kuracisto. Kaj multaj sociaj movadoj — kie vigle li partoprenis — perdis senlacan pioniron...

La falĉilo de la morto ne haltas antaŭ la penso: kiom da malutilo ĝi faros...

Leono Zamenhof estis plej fidela disĉiplo de sia frato nia Majstro. Naskita la 31. X. 1875 en Varsovio, li studis en la sama gimnazio, nur kun alia specialeco (laringologio), kaj instaligis por ĉiam en Varsovio. En 1905 li estis dum la japan-rusa milito kiel kuracisto, mo-



la INDA FRATO DE NIA MAJSTRO forlasis niajn vicojn por ĉiam.

bilizita kaj pasigis pli ol jaron en Mandjurio. En 1906 li revenas Varsovion kaj komencas ree sian regulan praktikon en hospitalo kaj private.

En 1909 li edziĝas kun fino Leokadja Warszawska, kiu estis por li plej fide-la akompanantino en la vivo (kaj bedaŭrinde al la eterna ripozejo ne povis akompani sian plej karan: pro grava malsano, ŝi estas forĝita al la lito ekde kelkaj monatoj) kaj donacis al li du filinojn.

Ekde plej frua juneco Leono sentis grandan amon al literaturo. Per tio klariĝas lia senlaceco je verkado de poeziaĵoj esp-aj, kaj tradukado de altvaloraĵ polaj poeziaĵoj en Esperanton. (Aspazio de Świętochowski, Protesilas kaj Laodamia de Wyspiański, verkoj de Reymont kaj al.) Krom tio li, kiel longjara redaktoro de Pola Esperantisto — kiam en 1908 la redakcio el Lvovo transiris Varsovion — li prenis je siaj ŝultroj la malfacilan taskon kaj tenis ĝin dum longa tempo — li pliriĝigadis nian literaturon per multaj malpli grandaj verkoj kaj verketoj. Pleje de li ŝatata estis la literaturlaboro sur la kampo de soci-etikaj demandoj. Li sisteme multe verkadis pri la kolonizo de Hebreoj en Sudrusujo. Krom tio li verkis broŝurojn pri aliaj etikaj demandoj (Pri egaleco kaj justeco), pri etiko en medicino, reformoj en hospitaloj. Laste en la loka gazetaro li tre aktive partoprenadis en la pristudado de la plej aktuala t. n. Hillerlanda demando, vekante veran admiron por sia profunda kaj noblekora pensmaniero. Speciale menciinda estas la de li eldonita granda verko (en pola lingvo): Historio de medicino, kun biografioj, aforismoj kaj anekdotoj.

Lia agado sur la esperanta literaturkampo estis plej aktiva antaŭ la milito. Pola Esperantisto alkalkulas la periodon, kiam li estis ĝia redaktoro, al siaj plej brilaj jaroj. Ankaŭ la U. Kongresanoj certe memoras lian viglecon dum tiuj solenajoj. Al tiu ankaŭ periodo apartenas lia verko „Mia Liro“. La lastajn jarojn li tamen ne ĉesis okupiĝi pri Esperanto. Li daŭre verkadis por Literaturo Mondo kaj al.. Li estis L. K. kaj Akademia Korespondanto.

Kiel plej specialan lian — kaj karakterizan! — meriton ni citu, ke li estis la fondinto de la intern-idea movado s. t. „Konkordo“. En Nro 14 de Esperanto Triumfonta (nuna Heroldo de E.) li pu-

blikigas epokan alvokon s. t.: La Korpo kaj Animo de Esperanto. Belega dukto ke la lingvo mem estas nur la korpo de Esperanto, dum ĝia animo estas nepre la interna Ideo. Kaj ne ripozante sur laŭroj, Leono Zamenhof ne kontentigas per simpla alvoko, sed baldaŭ kunvokas reprezentantojn de la varsoviaj samideanoj kaj sukcesas ĉiujn inspiri por krei tiacelan movadon. Tiel naskiĝis la esp. rondo „Konkordo“. Tiel naskiĝis la samnoma movado, kiu jam sisteme atingis brilan disvolviĝon kaj eĉ organizis du internaciajn fak-kunsidojn dum Universalaj Kongresoj (Vieno kaj Genevo). Tiu estis la ideo, kiun pleje ŝatis nia Majstro, kaj tiu estis la ideo, kiu instigis nian Majstron al kreado de lingvo internacia. Sekve la ideo de „Konkordo“ ne estis ia konsekvenco de Esperanto, sed kontraŭe — ĝia kaŭzo. Kaj tiu sama ideo, kiu puŝis nian Majstron al lia grandioza verko, puŝis ankaŭ Lian Fratron Leonon Zamenhof al la plej noblaj impulsoj. La devizon de Konkordo (Per Esperanto — al Repaciĝo kaj Konkordo), kiel ankaŭ la faman duparagrafan deklaron, ĉion ĉi kreis Leono Zamenhof mem.

La familio, aŭ pli ĝuste la frataro Zamenhof, kvazaŭ unu homo, senescepte havis kultron por la ideo de konkordo, por la ideo de unuigo kaj reciproka amo. Kaj el tiuj homamegantoj, plej intensan agemon evidentiĝadis Leono. Plene liaj agoj justigis du la pri li en Galerio de Zamenhofoj skribitan finfrazon: INDA FRATO DE NIA MAJSTRO.

La entombigo de Leono Zamenhof okazis dum bela suna tago — io tute eksterordinara por la Zamenhofaj funebroceremonioj — vendrede, la 9. VII. 34. je 13 h. Refoje falis sur miajn ŝultrojn la plej malĝoja honoro gvidi la funebran okazaĵon. En ĉeesto de amasego da homoj — inter kiuj pleje evidentiĝadis la kuracista mondo el Varsovio — precize je la difinita en nekrologoj horo, la kesto kun la korpo de Leono Zamenhof estis elportita el la kadavro-ĉambro de l' hebrea tombejo kaj la kantoro de l' Varsovia ĉefsinagogo S-ro Szymann - paciento de l' mortinto - komencis la religiajn kantojn kun sia ĥoro. La veturiletlo haltis kaj apud ĝi estis starigita tribuneno, sur kiu reprezentantoj de plej diversaj institucioj adiaŭis sian karegan kunfraton.

En la nomo de surd-mutuloj, kies plej bona amiko Leono Zamenhof estis ĝis sia lasta vivospiro, adiaŭis Dr. Meerson.

De la Societo de Kuracistoj de la Pola Regno — Dr. Milejkowski.

De la Estraro de Kuracista Helpo — Dr. Higier.

De la Kaso de Reciproka Helpo — Dr. Flanc.

De la tuta varsovia Esperantistaro — Sano Strelczyk.

De P. E. D. — redakt. Uziemblo.

De Konkordo — (kiel kreaĵo speciala de Dr. Leono Zamenhof — Konkordo ricevis la esceptan permeson aparte adiaŭi sian patron.) — la solan esperant-lingvan paroladon aŭdigis Fino Dr. Paŭlino Muszkatblat.

En la nomo de la plej alta instanco de la Esperanta Movado la U. E. A. kiel ankaŭ de la plej alta instanco de la Esperanta Lingvo la L. K. adiaŭis sian Kolegon LK-anon Sano Wiesenfeld.

La Kantoro rekomencas la kantojn, la funebra ceremonio ekmarŝas.

En la komenco iras kvarope la surd-mutaĵ lernejanoj kun siaj edukistoj. Poste formas grupon la kuracistoj. La kantoro kun ĥoro, la veturilo, puŝata de Esperantistoj kaj sekvata de la familianoj, fine amasego da publiko. Aparta veturilo havis sur si la tre multajn florkronojn kun belegaj diverskoloraj rubandoj de diversaj organizaĵoj.

Preterpasante la tombaro de Ludoviko Zamenhof la procesio haltas.

Ne malproksime de sia frato kuŝas Leono Zamenhof (apud Felikso).

Antaŭ la tombo refoje aŭdiĝas religiaj kantoj. La entombigistoj lasas en muta silento la keston en la teron. La familio senpense observas. La filinoj apenaŭ sin tenas sur la piedoj, kiuj ĉi-momente sin klinas... La edzino ne ĉe-estas...

Ankoraŭ unu adiaŭdiro: Dro Boleslaw Muszkatblat en la nomo de la Lernejo de surdmutuloj.

La ceremonio finita. La du orfinoj ne povas sin movi. Kun granda peno la Familianoj fortiris ilin de la freŝa tombo.

Kaj la suno brilis... Kaj la vivo daŭras... Nenio ŝanĝiĝas...

Varsovio, 10. II. 1934.

Edvardo Wiesenfeld.

L. K.

Leono Vienano.

Kial?

La gazetoj senĉese alportas al ni sciigojn pri diversaj novaj libroj Esperantaj. La peza manego de l' ekonomia krizo ne sukcesis subpreni la pulsantan vivon de la Esperanto-eldonejoj. Vere nia literaturo certe treege suferas de la malfacilega tempo kaj multo da manuskriptoj malpacience atendas la tagan lumon, ne povante eliri el la tirkesto de l' verkistoj pro manko de monrimedoj.

Sed spite ĉion ribele venkas la sanecaj ĝermoj de l' esperanta vivo la minacan faŭkon de l' krizo, aperigante pli malpli ofte novajn librojn, pli malpli gravajn, kiuj tamen atestas pri la daŭra kresko nia, estigante multpromesajn esperojn pri brila disvolviĝo de nia estonta literaturo.

Kun granda dankemo kaj rekono ni observas la viglan laboron de niaj eldonejoj, kiuj neniel volas submetiĝi al la senkompata sorto kaj daŭre vidigas la neelĉerpeblajn fontojn de sia agado.

Kaj jen plia laŭdindaĵo, kiu pruvas la seriozajn intencojn de la eldonistoj: la novaj eldonajtoj esp. ne malsuperas la alilingvaj nuntempajn librojn eĉ rilate sian eksterajn, ĉar la plimulto da ili estas eldonita laŭ la lastaj postuloj de la presarto.

Kaj inter la ĥoro de niaj eldonistoj, kiuj prave streĉas siajn ĉiujn fortojn por veki la legantaron el la letarga dormo kaj superŝutas ilin per diversspecaj legajoj, silentas tute la plej grava eldonejo nia, la eldonejo, kiu havas la honoron presigi la plej klasikajn librojn de nia lingvo, la tradukojn de l' Majstro.

Eble vi diros, ke la menciitaj libroj ne bezonas laŭtkriantajn reklamojn, ke ilia valoro estas nekontesteble rekoniĝanta. Vere. Sed ne ĉiuj esperantistoj, precipe la novuloj, estas sufiĉe informataj pri la legindaĵoj Esperantaj kaj vole-nevole ili estas forlogataj ekskluzive per lerte anoncataj eldonajoj **kies gravecon mi ne neas**, kvankam unuavice meritas centprocentan atenton la libroj, kiuj estas la plej firma bazo por nia lingvo kaj la plej grava gvidilo por la serioza stilisto Esperanta, kiu klopodas konservi la unuecon de la stilo kaj ĝian veran spiriton.

Je mia granda miro kaj ĉagreno mi ekscias, ke la menciitaj karaj klasikajoj

nijaj ne estas disvastigataj grandnombre, kion ili plene meritas.

Nun mi alpaŝu al la kerno de mia... protesto, jes! protesto, protesto de esperantisto, kiu ribelas kontraŭ la ekzistanta cirkonstanco.

Dekses jaroj forpasis de l' morto de la Majstro. Ni ĉiuj konscias, kia perdo/tiu ĉi frua morto estas por nia literaturo kaj lingvo, konsiderante la fakton, ke la Majstro decidis en la lastaj jaroj de sia vivo dediĉi sian tutan tempon al la traduka laboro, formelonte sian profesian okupon.

Kaj mi kunmetis la lingvan trezoron nian, kiun konsistigas la volumoj de Lia verkaro kaj rigardante ilin, mi sentis kordoloron je la penso, ke liu ĉi trezoro povus esti multe pli granda, sed la senkompata sorto ne indulgas...

Kaj iutage, ho strangajo! traŭgante la gazetaron mi estas frapita per mirinda sciigo: „Aperis tria volumo de la „Fabeloj“ tradukitaj de l' Majstro. Mi frotas miajn okulojn por konstati la fidiindecon de mia vidkapablo kaj mi konvinkigas pri la ĝusteco de mia vido. Kaj el mia koro elŝiriĝas la naiva demando: „Kial?“ Kial ne aperis ĝis nun tia netaksebla valcrajo? Ĉu ne aperis libroj en la esperantista mondo? Jes, aperis libroj esp., ĉar vivas kaj vivos esperantistoj. Tamen la tradukoj de nia Majstro ne aperis.

LA TEKNIKA FORMADO DE ESPERANTO-INSSTRUADO

Lerno estas ricevo. Instruo estas la prezentludo de la sciencavo; kiel la kuracisto sin priservas per la liberigo de la naturo interne de la malsanulo, tiel sin helpas la Esperanto-instruanto per la interna liberigo de la lernantula memagado.

La intensa kaj sistema influigo sur la lernanton, sciigante al li fundamentajn konojn, lertecojn kaj rutinojn — nomas sin instruo.

La Esperanto - instruo interperas impulson, evoluon, ekzercon kaj klerigon de la naturaj talentoj kaj fortoj al lerteco de buŝa kaj skriba uzado de la lingvo internacia. Aliflanke ĝi eduku fervoran kaj seriozan laboranton interne da la Esperanto-movado.

Kiel la kredo el la aŭdo, tiel komunkligas scio kaj kompreno el la instruo. Kiel la saĝa migrulo bone pripensas sian vojaĝon antaŭ ties komenco, ĉu

Kaj ho teruro! Mi ekscias, ke ankorau kelkaj volumoj de „Fabeloj“ atendas sian aperigon. Ĉu ni indifereinte atendos longtempe? Ni — esperantaj legantoj kaj studentoj de l' lingvo. Mi ne povas kredi, ke estas akceptata antaŭa abonpago por la pluaj neaperintaj tradukoj de l' Majstro — mankos volontuloj. Ĉu ĝusta disvastigado de la jam aperintaj verkoj de Zamenhof kun bela eksterajo kaj deca, pura de prezeraroj, eldonformo — ne kreus la konvenan fondon por kompleta aperigo de Liaj ekzistantaj manuskriptoj?

Mia Esperanta animo ribelas kontraŭ aranĝo, kiu baras la normalan disvolviĝon de eldonado de l' plej valoraj literaturajoj. En la tempo, kiam unu eldonejo esperanta sukcesis dum unu jaro aperigi ampleksajn librojn, unuarangan, revuon kaj eĉ efektivigas eldonadon de Enciklopedio, „dormetas“ eldonejo, ĝuanta la plej honoran rajton, rajton eldoni la tradukojn de l' Kreinto de Esperanto. Ĉu ĝi estas normala stato? Mi ne volas ekzoni la kaŭzojn. Kiaj ajn ili estas, ni forigu ilin plej baldaŭ.

La verkoj de Zamenhof — la alfabeto de l' stilo de la lingvo Esperanto — ekaperu en brilaj vestoj antaŭ la esperantistaro kaj okupu la plej honoran lokon inter la disvastigataj libroj esperanta. Neniu rimedo, kondukanta nin al tiu ĉi celo, estu malzorgata!

estas rilate al tempo, vojo, rimedo aŭ celo, tiel ankaŭ devas baziĝi la principoj instruaj sur bone pripensita plano, kiu ĉiurilate havu antaŭdestinitajn vojojn al ĝia celo.

Tiun ĉi vojon oni nomas metodo. La metodo dependas:

1. de la instrumaterio.
2. de la aspirata celo.
3. de la naturo lernantula.
4. de la persono instruanta.

Kio rilatas al la materio, la instruado devas profunde ekkoni la detalojn samkiel la internajn interligojn de la Esperanto-lingvo. Rilate al la celo instrua estas la plej grava vidpunkto, kiamaniere la ĝelernantoj plej rapide atingas la praktikan aplikon de la de ili akiritaj povoj, sed samtempe ankaŭ devas sukcesi la orela komprenrutino kaj la senĝena elparolado — la perfektigo de la esperantista pensmaniero.

Ne malpli grava estas la natura kapableco de la lernanto, la instrumaterio devas esti elektata laŭ ĝi. Observu la homan ekkonakiron! Ekzistas trisekvaj spiritkapablecoj: Koncepto — penso — apl'ko! — Tio estas metoteca triunuo, kiu sub ĉiuj cirkonstancoj dum la instruado devas esti konsiderata! Malgraŭ tio ankaŭ konsideru la personecon instruantan, ĉar ĉiu instruanto havas sian propran metodon kreitan de la intelekto. Unu kreas kapablajn, seriozajn ĝesperantistojn la alia kreas homojn, kiuj por la esperantistaro kaj nia afero estos al malprofito.

Ni kunigu unuflanke en materio kaj celo. Aliflanke en lernanto kaj instruanto... Prezas la instruanto la materion kiel fiksita kaj preta, tiamaniere ĝi estos „dogma“.

Ce pritrakto de la lingva materio la „dogma“ estas maltaŭga, ĝi bezonas la genetikan (evolucian). La lernanto volas mem perlabori la intelektan kompensojn! — Depende de la instrumaterio estos la genetika metodo diversmaniera. Disigante la tuton en ĝiajn elementojn, ĝi estas analiza, aŭ kunigante al tuto, ĝi estas sinteza. La analiza kurso estas aplikota por montri la ĉefajn elementojn, vortradikojn, klarigante per tio la kompensojn de la lernanto. Oni iras de facilo al malfacilo, de detalo al lingva leĝo, de rigardo al kompreno, de ekzemplo al regulo!

Temas pri eltiroj de lingvaj leĝoj, tiel oni ankaŭ parolas pri „indukto“ (konkludo je lingvaj elementoj).

La sinteza metodo proponas la kontraŭan vojon, ĝi derivas de abstrakto al konkreto, de leĝo al regulo, al escepto kaj ekzemplo. Oni ankaŭ nomas ĝin „dedukto“ (konkludo el la tuto pri la detaloj).

La analizo edukas la lernanton ser-

ĉi la kaŭzon, kutimigas lin vidi en la malgrando la grandon.

La sintezo ekzercas lin en la pensado. La unua ekkaptas la aferon de malsupre, la alia de supre. Ambaŭ valoras samkiel la en- kaj elspiro, ili estas la vivo de la instruado.

La sperto instruas, ke la genetika metodo (analiza kaj sinteza) estas la plej taŭga kaj fruktodona instrumaterio. Ĝi ĉiam konvenas al la spiritpovo de la lernanto kaj impulsas lin al memago. De la instruanto postulas la genetika metodo-procedo ĝisfundan scion, lingvan lertecon, ekzercon kaj instrulertan kapablecon. Fine paciencan!

La lernanto devas lerni kaj memakiri pere de propra memageco la lingvoformadon. La instruanto estu ĝardenisto, kiu kreas la konfidon por la lingva animo, por ke la kapableco de la ĝelernantoj kresku al interna poŝojo! El la interno al propra vivo!

Mallonge ni kunigu:

La metodo dependas de:
materio aŭ celo lernanto kaj instruanto
gvidpenso

materie-logike home-spirite

metodo donanta evoluanta
aŭ parolanta aŭ genetika
aŭ dogma

specoj de evoluantaj metodoj
disiganta derivanta
aŭ konkludanta aŭ kuniganta
„ analiza „ sinteza
„ indukta „ dedukta

- preferoj de la evoluanta metodo
1. ĉe materio: = facila derivado — komprena alproprigo
 2. ĉe la lernanto: = atentemon — memagecon — persistemon — lernojon — kuraĝon — kaj instigon.
 3. ĉe la instruanto: = ĝi postulas: ĝisfundan scion, lingvan lertecon, instrurutinon kaj paciencan!!! —
- Ervin Grundmann, Dresden.

„Aŭskultu popoloj“.

La Litovoj elsendas eksterlandan leterojn surhavantajn sur la koverto jenan kulpigon (presitan en 5 lingvoj): „Aŭskultu popoloj! La Poloj estas okupintaj litovujan ĉefurbon — Vilnius!“

Tiu fakto donis okazon al „Ilustrowany Kuryer Codzienny“ (Nr. 14 el 14-a de januaro 1934) por represii fotografiojn de unu letero kun tia koverto

kaj eldiri akompane sekvantajn reflektojn:

La naciista aŭ pli ĝuste kontraŭpola frenezo, kiu ekokupis la estrajn laktorojn politikajn de Kovno, ne malpligrandigas kaj ne ĉesas. Pri tiu temo ni skribis pli vaste antaŭ kelkaj tagoj. Nune unu el niaj amikoj sendas al ni novan dokumenton de litova frenezo. Jus el-

donis Litovoj propagandkovertojn, sur kiuj unuflanke estas vidata surskribo en kvin lingvoj: „Aŭskultu popoloj de l' mondo! La Poloj estas okupintaj Litovujan ĉefurbon — Vilnius!“ — dorseflanke landkarto, sur kiu la vilna distrikto (kuŝanta en Polujo) estas prezentita kiel parto de Litovujo.

Tiu ĉi furiozeco estas pure negativa. La kovnaj ŝovinistoj scias, kion ili malamas, sed proprasence ili ne scias, kion ili amas. Ili scias, kion ili ne volas, sed ne scias, kion ili volas.

La profesoro de kovna universitato Józef Albin Herbaczewski, kiu estis devigita forlasi Kovnon, kiam li komencis... paroli veron, aperigas nun okaze de tiuj kontraŭpolaj inklinoj tre sciindajn artikolojn en polaj jurnaloj.

En unu tia artikolo presita en „Tygodnik Ilustrowany“ (Ilustrita Semajnogazeto) s-o Herbaczewski skribas:

„La estroj de sendependa Litovujo forjetis laŭhistorian tipon de Litovo (— ĝi estas tro poleca —), ili forjetis la historian kulturon de Litovujo (— ĝi estas altrudita de Poloj —), ili forjetis „tradiiciismon“ (la kulton de historispirito), kiu estas bazo de angla kaj japana kulturoj. Ili do tuj estas rimarkintaj, ke Litovujo ne posedas nacian kulturon (curiosum — kuriozajo!). Pasintjare ekigis en Kovno diskutado pri naci — litova kulturo kaj montriĝas, ke „proprasence Litovujo sian propran nacian kulturon ankoraŭ ne posedas, apenaŭ ĝin kreas“.

„Pro kio do la litovaj ŝovinistoj batalis kun Poloj pro „pureco de litova kulturo“ por konstati subite neatendite, ke proprasence pure litova kulturo ankoraŭ ne ekzistas?“!

Al tiuj vortoj, skribitaj de litova patrioto, kiu dum daŭro de sia vivo en la nomo de litoveco kontraŭigis ne unu fojon kontraŭ Polujo — ni havas nenion por aldoni — konkludas la raportanto.

Sed tamen ni, esperantistoj, havas ankoraŭ unu titolon por kondamni tian batalmanieron. La citita nome alvoko estas sur kvina loko presita ankau en esperanto, tiu instrumento de deaia internacia konkordemo. La uzado de esperanto por simila politika batalo plej ĉefe taŭgas por enkonduki malkonsenton, malkonkordon, batalon en la rondojn de internacia esp-istaro. „Ĉesu kaj ĉesigu vian malbonan ludon“, amikoj! La solvon de koncerna problemoj ni lasu al la politikistoj, sed en internaciaj rilatoj ni restu honestaj — sen insultoj kaj kalumnioj!

Se nia Majstro estus travivinta similajn spertojn kaj kripligon de Sia alta ideo, certe la Bulonia deklaro pri esprisimo estus pli singarde precizigita. Ĉu ni rajtas, ĝin trouzi?...

Transskribis Józef Orzech.

Unuaranga, kosmetika instituto „Espero“ sub gvido de nia samideanino f-ino Hermina Bertig, studenta ĉe Universitá de Beauté „Cedib“ en Parizo — estas malfermita en Kraków ĉe str. Rakowicka 19, m. 11. Por esperantistoj speciala granda rabato.

Lola Blankówna, Lwów.

LA ŜTALA KORO.

Mi prezentas min: mi estas Dro Andreo Lumière, posedanto de grandaj industriaj uzinoj kaj de granda kuracejo en Parizo. Certe ne unu el la legantoj miros, kial mi entute skribas. Mi faras tion tial, ĉar mi havis en mia vivo teruran kaj strangan aventuron. La travivaĵo estis tiel speciala, ke mi decidis fari sekvantan rakonteton.

Kiam mi havis 25 jarojn, mi kaŝis min en ŝipo iranta al Ameriko kaj atingis Nov-Jorkon. Tiam mi volis studi medicinon, sed tie oni ne kontentigis min. Mi iris al Anglujo, vizitis Francujon. Dum unu el miaj vojaĝoj al Francujo, mi sidis en rapidvagonaro proksime al du fremduloj. Tie mi rimarkis sinjoron, kiu vane klopodadis kompreni ian paragrafon de la medicino. Servoprete mi paŝis al li kaj demandis lin france, pro kio li klopodis. La fremdulo respondis ridante: en tiu momento mi mem ankoraŭ nenion scias, „ŝajnas al mi, ke mi planas ion, sed ne estas ebleco ĝin efektiviĝi“. Post tia respondo mi adiaŭis lin kaj foriris.

Tiu ĉi sinjoro estis la bone konata kuracisto sinjoro Kovrillo el Parizo. Post nelonga tempo mi renkontis en kafejo la saman sinjoron, li salutis min afable kaj diris: „Karulo mia, mi „ĝin“ ekstudis“. Kio „ĝin“ estas?, mi demandis. „Ĉu vi ne scias?“ Do, bonvolu iri kun mi“. En la skriboĉambro de la Hospitalo, en kiu mi kuracas, mi klarigos „ĝin“.

En la Hospitalo li diris: „Gratulu al mi, sinjoro doktoro“. „Miaj provoj, anstataŭiĝi veran koron per ŝtala aparato sukcesis bonege. Ĉu vi eksperimentis

ĉe bestoj?", mi demandis. „Ho, ne!", li diris kaj liaj okuloj ekbrilis kolere, „la objekto de mia eksperimento estas la — homo”.

Mi paliĝis. „Ĉu vere? „Ĉu vi trovis vivantan homon, kiu decidis subigi al via eksterordinara eksperimento?” „Mi mem estas tiu ĉi objekto; mi mem mortigis min kaj nun reviviĝis, mi vivas kun ŝtala koro”. „Aŭskultu, sinjoro Dro Lumière, tiun ĉi baton en mia brusto: Tik, tak, tik, tak”. Efektive mi aŭdis tiun ĉi „tik — tak”. Post tio ĉi la kuracisto Kovrillo adiaŭtis min per vortoj: „diru al neniu ion, ĝi estas mia propra sekreto”.

Post kelkaj minutoj, en la momento, en kiu mi volis foriri, eniris sinjoro X. direktoro de la Hospitalo en Parizo, ĉi-

rante al mi: „Sinjoro Lumière, la saman historion rakontis al mi antaŭ unu semajno en granda sekreto kuracisto Kovrillo. Tiam mi lin tute ne komprenis. La amiko de la kuracisto informis min, ke tiu ĉi doktoro pro tro longa laboro, ekstudi ian eksperimenton, frenezigis. Li ofte furiozis, tial li loĝas en Hospitalo, interparoladas kun aliaj kuracistoj pri sia eksperimento, kaj tio donas al li iluzion de sia stranga, imagita grandeco kaj gloro”.

„Bene sed kion signifas tiu ĉi voĉo el lia brusto?”

„Kiel?” Ĉu vi ne konas tiun usonajn horloĝojn sinjoro Lumière?” Tiam ĵus havas la malfeliĉa kuracisto Kovrillo en sia veŝto”.

DELIKATA AFERO.

(Anstataŭ „Lingva Esploro”.)

Hodiaŭ mi pasis kun samideano preter esperantolingva elpandajo filatelista pendanta en la Ĉesplaco. La samideano ĝojis. Mi kritikegis la multajn „ojn”, „ajn”, kiuj eĉ sur tiel malgranda spaco ne mankas.

— Ne pensu, ke mi estas kontraŭulo de -oj -aj, -uj ktp. Tute kontraŭe. Legu la opinion de prof. Mayor, kiun mi citis en febr. numero de „Esp. dla Wszystkich”: la fama latinisto speciale ĝuis la oj-aj finaĵojn de Zamenhof. Sed imagu la impreson faratan de tia elpandajo je la publiko ĉiutage leganta tion...

— Tamen — la samideano „tamenis” per elokventaj vortoj mian opinion.

Mi forgesis tuj, post interadiaŭo, nian diskuteton. Sed unu horon post ĝi mi trovis sur mia skribotablo i. a. „Kurjer Poranny”, varsoviajn ĉiutagajon, kie mi legis sekvantan noton:

„Slyszeliŝmy z Krakowa w dniu 24. stycznia sympatyczny głos p. Chodowieckiego (devas esti: „Hodakowskięgo”, kompreneble), który wygłosił odczyt dr. A. Gadomskiego o „Podróżnikach polskich”. Co do mnie, — podziwiam radjo za jego lustro „wizualności fonetycznej”, do dziś dnia bowiem chodzę z głową przepelnioną komicznymi dźwiękami. Włoczą się one, pięttrzą — i — wylewają z uszu wibry nagromadzonych wyrazów: —

„Jan de Kolno... regi konducis ekspedicion... studis geografijon... kartai kai... polaj nacijaj... Francijoj... politikaj Anglujaj... Australijaj!” Od-

czył był bowiem po esperanku.

Jestem pełen szacunku dla pracy Zamenhoffa. Jestem głęboko wzruszony, ilekroć pomyślę, że z Polski właśnie wywędrowało esperanto na szeroki świat i stworzyło koła przyjaciół naszych nawet w Japonji. Jestem również za koniecznym rozgłosem nazwisk i zasług polskich podróżników... Ale przez radjo ten międzynarodowy język brzmi poprostu — nieradjofonicznie; jeśli zaś chodzi o jakąkolwiek propagandę, wyrządza sam sobie niedźwiedzia przysługę. Sądząc z radja, esperanto jest takim językiem, który najlepiej brzmiałby po cichu. Tak, żeby go nie było słyszeć. Bo, i wogóle, — ma rację prof. Tad. Zieliński, że klin — klinem, ale i dzisiaj stokroć praktyczniejsza w użyciu okazałaby się łacina. Ludzie mogliby przynajmniej ruszać się swobodnie wśród grobowców i rozumieć na nich wszystkie napisy...

La aŭtoro de la artikolo ankau prof-on Zieliński ne flatas. Tre prave li pensas, ke se la latina lingvo estus internacia, ĝi servus por interparoli kun — mortintoj...! Sed nin interesas la impresoj, kiun faris je li la oj-uj-sonoj.

Ĉu komentario estas necesa? Laŭ mia opinio ankau radioprelego povas esti konvere redaktata, sen ŝoki la profanajn orelojn, kaj kvankam ni ne devas honti pro la esperanta multenombro, mi devus laŭeble eviti „ursajn... servojn”

Estas delikata afero koncernanta nian propagandan taktikon, kaj tamen mi opinias, ke estis necese tuŝi ĝin en la intereso de nia afero kaj ties disvastigo.

Dr. Leopold Dreher.

Nota. Pro manko de loko nun — mi respondos en la plej proksima numero de P. E. T. **Hodakowski.**

INTERESAJ SCIINDAĴOJ

Ilustrowany Kurjer Codzienny 11. XII. 1933. Nr. 343:

(J. G.) En la atlasoj de la ĉielo kaj en la astronomiaj analogoj troviĝas nomoj polaj, donataj al diversaj ĉielobjektoj. Ekzemple unu el plej belaj regionoj de la Lakta Vojo portas — kiel sciante — la nomon: Sildo de Sobieski, dum unu de plej potencaj ringmondoj sur la Luno estas baptomita per la nomo de la plej granda el ĉiuj tempoj astronomo: Kopernik. Ni havas jam ankaŭ kvar „polajn“ kometojn. Inter la planedoidoj ni renkontas simile polajn nomojn, kiel: Dembovska, Valeska, Ceraskia, Polonia.

VIZITU POLUJON!

Se vi volas viziti Polujon, turnu vin al Pola Touring-Klubo (str. Kredytowa 5, Varsovio, Polujo), kiu detalajn informojn sendos al vi senprokraste kaj prizorgos malkaran vojaĝon kaj restadon en Polujo. Oni korespondas en Esperanto.



D I S T R A Ĵ O J



EL SKOTLANDO.

„Kuracisto“, diris skoto, „mi havas spliton da ligno en la lango“.

„En la lango? Kiel tio okazis?“

„Botelo da viskio falis sur la plankon“.

Skoto jus pagis fakturon ĉe la pordego de restoracio. Trifoje li kontrolas la sangmonon. „Ĉu ĝi ne estas ĝusta?“ demandas la kasistino kolere. „Mfm!“ respondas la skoto; „ĝusta ĝi estas, sed nure!“

Unu decembran tagon skoto venis suden por viziti amikon dum kelkaj tagoj. Sed li restis kaj restis. Finfine la amiko diris: „Nu — ĉu ne estus bone, se vi estus kun via familio je kristnasko?“ — „Mil dankoj!“ respondis la skoto, „mi tuj telegrafos por venigi ilin“.

INFANA BUŜO.

Onklo (al sia eta nevo): Kion vi de-

Laste — laŭ oficiala katalogo de malgrandaj planedoj por la jaro 1934 eldonata de La Astronomia Kalkulinstituto en Berlino — du novaj nelonge malkovritaj tiaj korpoj estas signifitaj per nomoj polaj. Ili estas planedoidoj ŝniadeckia kaj Varsavia. En la kronologia tabelo, enhavanta laŭvicon de malkovro de tiaj korpoj ili portas la ordnumerojn: 1263 kaj 1264.

Ŝniadeckia kaj Varsavia estas korpoj negrandaj, pene rimarkeblaj — kaj nome nur dum afelio (kontraŭsuna pozicio) — helpe de teleskopoj disponataj de polaj observatorioj. Ili ĉirkaŭkuras la sunon unu fojon dum kelkaj jaroj laŭ elipsoj kuŝantaj inter la vojoj de Marso kaj Jupitero. La orbitoj de nomitaj planedoidoj, malkovritaj en marto antaŭjare de S-o Arend, asistanto de observatorio en Uccle (Belgujo) estis pri-kalkulitaj — kiel sciigas la supre citata fonto — en la krakova observatorio de f-ino Lidja Stankiewicz.

(Kiel sciante Jan Ŝniadecki estis fondinto kaj la unua estro de Krakova observatorio).

Tradukis J. Orzech.

ĈU VI

FINPAGIS LA ABONON POR J. 1933?

REABONU POR J. 1934!

POŝTĈEKO ALDONITA.

ziras por via naskiĝotago?

Nevo: Skribmaŝino, kiu plenumos miajn lerneajn taskojn. (W.)

Instruisto (al la lernantoj): „Se la sinjoro lerneja inspektoro ekzamenos vin, ĉiam aldonu al la respondoj la titolon „sinjoro lerneja inspektoro“, ĉu vi komprenis?“

La inspektoro alvenis kaj demandis unu lernanton: „Kion diris Dio al la serpento?“

„Vi devas rampi sur via ventro kaj manĝegi polvon ĉiutage dum via vivo, sinjoro lerneja inspektoro!“

(A. Hollitzer).

Fremdulo: Diru, etulo, ĉu en via vilaĝo troviĝas vidindaĵoj?

Knabo: Jes, sinjoro. La buĉisto Majer povas movi siajn orelojn, kaj mia avino havas lipharojn.

(A. Hollitzer).

Frideriko Chopin kaj lia misio.

La okcident-eŭropa muziko travivis en unua duono de XIX jrc. grandiozan floradon:

Germanoj havis Beethoven'on, Weber'on kaj Schubert'on, italoj havis majstron de „bel canto“ Rossini'n kaj demonon de violona ludo Paganini'n. **Romantika** muziko disvolvis entuziasmiĝan brilon de ne konata ĝis nun beleco. **Pola** muziko, bedaŭrinde, staris flanke.

Kaj ja ankoraŭ antaŭ ne longe vekis la pola **popola** muziko ĉie raven. Germana filozofo, Daniel Schubart en sia verko: „Ideen zu einer Aesthetik der Tonkunst“ entuziasmiĝadis pro la senkompara ĉarmo de l' pola popola muziko, dirante:

„l'uta Eŭropo ĝin imitas. Kantoj kaj dancoj polaj apartenas al la plej belaj kaj plej ĉarmaj el kantoj kaj dancoj de ĉiuj aliaj nacioj“.

Antaŭ ne longe ankoraŭ **polonezoj** de princo Miĥaelo Ogiński estis objekto de admiro en Germanujo kaj Francujo. Ĉie oni ilin presis. Ĉie sonadis iliaj sopirigaj melodioj.

Kaj tamen ĉi ĉio estis nur **kruda materialo**, el kiu oni devis krei **verkon de arto**. Mankis ĝis nun majstro, kiu havigus al la belo de pola nacia muziko la plej altan **artisman formon**.

Fine aperis Geniulo! Frideriko Chopin. Li ne nur riĉiĝis la polan muzikon per novaj teknikaj akiraĵoj, sed enportis en trezorejon de la nacia kulturo la plej altajn kreajn valorojn.

Disputo pri **nacieco** de Chopin estas vana. **Poleco** de Chopin restas ekster ĉia ajn dubo:

Ĉar Chopin elkreskis el pola **tero kaj** elkantis inspiritan melodion, en kiu vibras eĥo de la patruja lando.

Konataj estas la vortoj de Henriko Heine pri Chopin:

„Polujo donis al li spiriton de kavalireco kaj sian historian doloron,

Francujo donis al li ĉarmon kaj flugemon de graciaeco, kaj Germanujo donis al li romantikan profundon“.

Belaj vortoj, sed ili **ne elĉerpas** la enhavon de tio, kio konsistigas esencon de la Chopin'a muziko! **Mankas** ĉi tie unu fonto de la verkado de Chopin: ĉar Polujo donis al li ne nur la spiriton de kavalireco kaj sian historian doloron, sed donis al li **trezoron de popolaj melodioj**, ellulis lin per **kauto de siaj mazoviaj kampoj**. Kiam poste la sorto jetis lin sur fremdan teron, elmigrigis lin al Francujo, de kie neniam li estis revenonta Polujon, tiam la eĥo de l' patruja kanto elsonadis al lia sopiranta fantazio viziojn de l' pola pejzaĝo, kaj lian muzikon saturadis per tono de elegio. Chopin povis plenumi sian honoran **nacian mision** nur tial, ĉar li sorbis en sin belecon de pola muziko kaj havigis al ĝi la plej artisman kaj inspirplenan esprimon.

Mistera estas **la grandeco de la Chopin'a genio**. Esencon de l' genio ne eblas enfermi en kadroj de ia sinteza formulo. Genio estas unu; genio ne ripetigas. En tio konsistas la aparteco de Chopin kaj lia grandeco. Se ni tamen supozos, ke ekzistas ĉuspeca tipo de genio, t. e. **klasika kaj romantika**, ni devas Chopin'on difini kiel tipon romantikan.

La klasika tipo maturigas malrapide, kiel aŭtuna frukto. Komence ĝi ne esperigas ion ne kutiman. Sed ĉiu posta verko estas ĉiam pli perfekta, estas ĉiam pli alta ŝtupo de artismo.

Alie la genio **romantika**: ĉi tie mankas mildaj trapaŝoj kaj laŭgradaj etapoj de evoluo. Ĝi tuj helas per plera brilo. Karakterizas ĝin tro frua matureco; sed ankaŭ tro frua kaj rapida kadukeco. Romantika geniulo mortas junage. Sed kvazaŭ antaŭsonante la fruan morton li verkas febre. Lia verkado havas en si ion elementan: ĝi estas kvazaŭ erupcio de verkaj fortoj, kiuj kirliĝas kaj fluas, kiel vulkana lafo. Tial la verkado de romantika geniulo estas kutine tre abunda kaj vekas miregon jam per mema nombro da verkoj. Ĉi tie oni ne povas paroli pri evoluo de perfektigado. Ĉiu verko estas matura en formo kaj enhavo.

Tiam ecojn de la romantika genio havas Chopin. En esencon de la Chopin'a genio plej profunde penetris Henriko Heine, dirante:

„La genio de Chopin devenas el la lando de Mozart, Rafael kaj Goethe. Ĝia patrujo estas la fantazia lando de poezio“.

De la unua momento, kiam Chopin elpaŝis, ĉiuj eksentis, ke aperis **geniulo**. Kun mirego oni rigardis al tiu „**anirakla infano**“, kiu, kvazaŭ iam Mozart, per sia ludo jugis la korojn de l' aŭskultantoj. El biografio de Chopin ni konas interesan detalon: — la pola nacio estis tiam en rusa mallibero. Gubernatoro de Varŝavo estis ĉefduko **Konstantino**, severa tirano, pasia kaj kolereza. Ekkoleriĝinte, li vekis teruron inter plejproksimuloj. En tiaj okazoj lia edzino, princino el Łowicz, Johano Gruzzińska, sendadis kiel eble plej rapide kortegan kaleŝon antaŭ la domon de ge-sroj Chopin, por venigi la 10-jaran Frederikon, kies pianludo admirinde kvietigadis la furiozatakojn de l' ĉefduko. Efektive, kiam la malgrandulo komencis ludi, la senbridiĝintaj nervoj de duko Konstantino kvietigis, lia nuba frunto sereniĝis. Nevenkebla estis la ĉarmo de tiu ludo de la genia infano.

Ni havas multvaloran restaĵon el tempoj de lernado de Chopin en Varsovia konservatorio. Ĝi estas la **katalogo** de ĉiutempaj lernantoj el klaso de komponado de profesoro **Josefo Elsner**. Jen en tiu ĉi katalogo notis Elsner pri sia 17-jara lernanto en tria lernaro la vortojn:

„**Muzika geniulo**“.

Profetaj vortoj! Kelkajn jarojn poste **Robert Schumann**, fama komponisto en la romantika epoko kaj subtila kritikisto, foliumante apenaŭ duan verkon de Chopin: Opus II (duan) t. e. „Variacioj je temo de Don Juan“, vokas ravite:

„Hut ab, meine Herren, ein Gen'e“!

(Capelara for, sinjoroj, jen geniulo).

Kaj vere sur la terenon de l' eŭropa muziko enpaŝis **geniulo**, kiu al ĝia d'svolvo montris novajn vojojn kaj donis novan direkton.

*

*

*

La muziko de Chopin posedas karakteron de viziula **improvizajo**. Teknika flanko malaperas ĉi tie preskaŭ komplete, kaj la sonoj fluas kun tia natureco, ke eĉ por momento ni ne pensas pri verkista fortostreĉo, kiu nepre akompanis la naskiĝon de tiu muziko.

Ke tiu muziko havis la karakteron de improvizajo, konfirmas tion ekzemple legendo pri kreiĝo de la potenca polonezo **As-dur**, unu el plej grandiozaj komponaĵoj de Chopin.

Jen kreante tiun polonezon, havis Chopin **halucinon**: dum malfrua nokta horo li sidis ĉe piano. Subite ŝajnis al li, ke malfermiĝas la pordo de najbara ĉambro, kaj tra ĝi enpaŝas procesio de majestaj figuroj malnovpolaj: fieraj hetmanoj, vojevodoj kaj kastelestroj, ornamitaj per multekostaj peltoj, atlasaj kontuŝoj, zibelaj ĉapegoj kaj riĉe oritaj zonoj, kun sabroj pendantaj kaj dignoplenaj sinjorinoj en puntaj roboj kaj kufoj. Tiu tuta majesta sekvantaro danĉepaŝas antaŭ li po- pare, laŭ takto de lia triumfa muziko.

Vere la polonezo As-dur impresas kiel potenca impro- vizajo.

La Chopin'a muziko estas saturita de sento. La plej mal- forta senta krcmmovo ŝanĝiĝas je sono, en kiu vibras kaj ekstazo de amo kaj paroksismo de doloro. Ĝi estas muziko ĝisfunde **subjektiva**, karakteriza por **romantismo**. Subjekti- vismo de l' epoko trovis ĉi tie sian plej perfektan esprimon.

Sendependa de la tradicio, fariĝis Chopin **malkovrinto** de novaj formoj kaj de novaj teknikaj rimedoj. Kiam da ne an- taŭsentataj **koloroj** ellogis Chopin el **piana** sono! Per kia **po- ezio** alparolis la muziko! Kaj la ĉarmo de Chopin'a **harmonio** kaj ĝia revelacia noveco! Ĉu oni povas imagi muzikon de Ri- chardo Wagner, precipe al „Tristano kaj Izoldo“ sen Chopin'a harmonio?

Sur akiraĵoj de la Chopin'a muziko apogis sin fine la mo- derna muziko. En tio konsistas la granda historia **misio** de Chopin.

Sed por Polujo estas krome en lia muziko alia valoro: ĝia **patriota melodio**. La revolucian karakteron de la Cho- pin'a muziko indikas jam Robert Schumann. Jen liaj vortoj:

„Se la autokrata caro de ncrdo supozus, kia danĝero ka- ŝas sin en la muziko de Chopin, li malpermesus tiun muzikon. Mazurkoj de Chopin — jen kanonoj kaŝitaj en floroj“.

Jes, ĉar tio estis **kanto de ribelo**, kanto de nacia kons- cio. Per Eŭropo estis Chopin **neoficiala ambasadoro** de la subjugita nacio. „Polonezo A-dur“ estis nia Marsejla kanto. La muziko de Chopin estis por Polujo **kanto de espero** kaj kon- solo.

En sia muziko fermis Chopin **sentan mondon de l' pola animo**. De tie devenas ĝia escepta signifo por Polujo. La mu- ziko de Chopin fariĝis nia **nacia sanktaĵo**.

TEATRO KAJ FILMO

KELKAJ NOVAJ POLAJ FILMOJ.

Oni parolis kaj parolas ankoraŭ multe pri pola filmo kaj pri pola filmproduktado, ekzemple: ke „venis jam la lasta tempo, por ke nia hejma produktado eliru fine el sia lulilo:” „por ke ni povu fine veni kinejon por rigardi polan filmon, ne nur pro ĝentileco por pola filmo kaj ne kun espero ke „eble ĝuste tiu ĉi filmbildo estos pli bona”, k. t. p.

Estis pravaj tiuj, kiuj tiel parolis, kaj tiuj, kiuj tiel pensis, ĉar ĉi tiu ĉi nia filma suĉinfano, havas jam almenaŭ dekkvin jarojn, se ne pli multe.

Versajne la eternaj veplendoj, minacoj, kondiĉoj kaj „senŝanĉeligaj” decidoj traigis per teruro ĝin, kaj eble plie ĝiajn „edukantojn” ĉar... pli kaj pli ofte ni renkontas bonajn filmojn pliproksimiĝantajn ĉiam pli, kaj je ĉiu viktorkanto, al idealo, kiel tia ni opinias, ankoraŭ ĉiam, la eksterlandajn filmojn.

Pasis jam „feliĉe” seria periodo de filmoj, kaj donu Dio, ke neniam revenu, ĉar ni devas konsenti, ke ŝablono en la filma produktado estas eble plej malmulte dezirinda.

La homa naturo ŝatas variecon, kiu en griza ĉiutaga laboro ofte malfacile estas trovebla, kaj tial la distrajo devas ĝin doni. Ni havis jam serion de patriotaj filmoj kun neevitebla armeo, filmojn, de kiuj fono estis la „ŝaŭmaĵoj” de grandaj urboj, kun tradicia drinkejo, komediaj filmoj k. a.

Kiam tiujn temojn oni ĝisfunde elĉerpis, rekonsciiĝis reĝisoroj kaj filmaj produktantoj kaj komencis serĉi novajn, kiujn ili ankaŭ trovis: ĝi estas la plej ĝusta vojo, sur kiu jam paŝas ia alilanda produktado.

Oni komencis pli multe interesigi pri la teknika flanko de la filmo. Oni komencis rigardi kiel modelon la bonajn konceptojn de eksterlandaj reĝisoroj, malgraŭ ke diversloke fariĝis aŭdeblaj voĉoj, ke oni imitas la fremdajn ideojn. La aliaj tamen saĝe kontraŭdiris, ke ĝis kiam ni ne atingos la ĝustan nivelon sur la filma kampo, ĝis tiam ni imitu bonon, anstataŭ vidigi originalajn senvalorajojn.

Do la filmo s. t. „Lia ekscelenco komico”, kiu estas kvazaŭ la finiĝo de la filma komediserio, estas jam longa paŝo antaŭen sur vojo de pliboniĝo al pli hela filma morgaŭo.

Prilaboro de la temo inda de la kre-

into de „Miliono”, artista ludo, elekto de artistoj (Ĉwiklińska, Ina Benita, Tom, Bodo) k. t. p. jen ĉio, kio montras plialtiĝon de nia filma produktado. En la ĉefa vira rolo, (kiu tie ĉi estas samtempe la titola), ni ekvidis bone konatan Eugeniusz Bodo, kiu brile plenumis sian taskon.

Sed plej grava, dezirinda ŝanĝo, estis forigo de deklamitaj dialogoj, kaj nenatureco ĝis nun reganta polan filmon.

Laŭvice dua filmo, kiu rompis ĝisnunan „tradicion” de nia produktado estas „Spiono en masko”. Temo multeble jam prilaborita kaj eluzita por filmaj scenaroj. Ni vidis jam analogajn filmojn en usona produktado kun Marlena Dietrich (X. — 27.) kaj Greta Garbo (en la filmo s. t. „Mata Hari”). Tio tamen ne povas influ, ke mi ne diru kelkajn varmajn vortojn, je utilo de nia filmo. En la supre citita pola filmo ni trovas kelkajn vere tre bone elpensitajn momentojn. Rekreintino de la titola rolo, Hanka Ordonówna, kiun ni la unuan fojon havas okazon vidi sur la ekranon, ne trompis nian esperon. Ni ricevis tre agrablan impreson, admirante sian talenton ne nur de kantistino, sed ankaŭ de filma aktorino. Unu solan riproĉon, kiun mi povus prezenti, estas la manko de fotogenio ĉe ŝi. Ŝia vizaĝo rezultis iomete pale kaj plate, la mankon de plastekeco de trajtoj oni mise sentas.

Kompensas, tamen tiujn mankojn ŝia bela kantado, kiu korusas ne nur kinejan rigardanton, sed ankaŭ la aŭdantojn de l’ ekranon (la sceno en la kabaredo).

La pluj filmoj, kiujn ni laste vidis, iom post iom konvinkas nin, ke la pola filmo trovis jam la ĝustan vojon.

Unu el tiuj filmoj estas „Ludilo”, ilustranta vivon de „Girls”, en kiu ni denove admiras aktorinon Eugeniusz Bodo en la rolo de vilaĝa deloganto. Li ludas kiel ĉiam — se mi povas min tiel esnrimi — koncerte.

Bodo — jen multflanka artista talento kiu scipovas superlevi tian rolon, kiel li en la supre citita filmo rekreas, sur la nivelo de unuarangaj kreaĵoj, ĝuste dank’ al sia ne ĉiutaga kapableco.

Krom Bodo aperas en tiu ĉi filmo preskaŭ nova vizaĝo, nova artistino Alma Karr. Aktorino kun altaj filmaj valoroj, dank’ al kiuj ŝi plenumis sian

rolon bonege; malavaraĵoj eksteraj kondiĉoj, facileco kaj senĝeneco en la moviĝo, agrabla voĉo, — jen siaj boraj ecoj. Alma Karr aperas en tiu ĉi filmo en rolo de kantistino kaj kabareda dancistino.

Krom tiuj du geartistoj, distingigas per sia laŭdirinde prezentita rolo de vilaĝa mastrino, Helena Zarembina, kiun ni havas okazon aŭdi tre ofte en radio-programoj, en tiel nomataj „imagecaj teatroj“.

Dank' al bone kreita rolo, Zarembina elŝoviĝis je la „frunto“ de virinaj roloj.

Ankaŭ tie ĉi, mi devas rekone substreki la bonan teknikan flankon de la filmo, kiu staras vere sur alta nivelo. La fotografa flanko estas ankaŭ tre bona. Cetere, en tiu ĉi regiono, la pola filmo havas jam malantaŭ si belajn kaj multvalorajn akiraĵojn kiel ankaŭ sian tradicion (vere belajn fotojn ni trovis en filmoj: „Krudulo“, „Dezerto“, en montaraj filmoj k. a.). Tie ĉi en „Ludilo“ ni vidas denove tre belajn bildojn (Vilaĝaj bildetoj, arbaroj k. t. p.)

Se temas pri muzika ilustraĵo, mi aldonas, ke ĝi estas ankaŭ tre bona kaj nekulime melodija kaj agrabla.

Unuvorte la filmo s. t. „Ludilo“ estas tre sukcesa, okupas rigardanton de komenco ĝis fino, konservante dum la tuta daŭro tre vigan ritmon.

Post sufiĉe longa interrompo ni ekvidis denove nian faman stelon Jadwiga Smosarska. Sed jam ne en rolo de pola kabineto, kiun tipon ŝi plej ofte rekreadis, sed en rolo ekstreme diferenca, en rolo de prokuroro (en filmo s. t. „Prokuroro Alicja Horn“). Krom ŝi ludis en tiu ĉi filmo Brodniewicz kaj tre talenta juna arlistino, ankoraŭ duoninfano, Zosia Mirska.

Specialan rolon en pola produktado okupas filmo „Verdikto de la vivo“. La scenaron prilaboris s-ino Morozowicz-Szczepkowska, aŭtorino de jam tiel konata „Afero de Monika“. Oni povas ne konsenti kun la ideo de tiu scenaro, sed oni devas kun plezuro konfesi, ke tiu ĉi filmo prezentas tre pozitivan pozicion en nia enlanda produktado. Al la sukceso kunhelpis s-inoj Irena Eichlerówna (konata el fama teatraĵo „Fräulein Doktor“) kaj Jadzia Andrzejewska, kies debuto estas en ĉiuj direktoj kontentiga.

Estas certe, ke nia filmo eniris la ĝustan vojon. Oni produktu pli multe da tiaj filmoj, kaj ni pli volonte enkinejiĝos por rigardi niajn polajn filmojn, ol bildojn de eksterlanda produktado, kiuj — ĝis kiam oni ne enkondukos Esperanton — estas por ni en plej granda parto tute ne kompreneblaj.

Irena Traumówna

NOVAĴOJ EL ESPERANTUJO

„Esperanto en la lernejoj kaj la praktikon“. Sub tiu signalvorto okazos en Vieno la 20—24 de majo 1934 internacia Konferenco sub la protekto de Prezidanto Miklas kaj sub Honora Prezido de kanceliero Dollfuss. La necesan monon por la preparaj laboroj disponiĝis la Ministerio por Komercio kaj Trafiko.

En tiu ĉi konferenco estas invitataj partopreni: el kampo de komercio kaj industrio: komercaj ĉambroj, foiroj, komerciernejoj; el kampo de la trafiko: fervoj, ŝip- kaj aervetur-kompanioj; el la instrua sfero: universitatoj, instruistaj organizoj, filmkompanioj, k. t. p.

La konferenco per paroladoj kaj raportoj kunigos ampleksan materialon por apogo de siaj postuloj. Ŝi faros proponojn pri enkonduko de Esperanto en la lernejoj kaj praktikon de ĉiuj landoj. Fine ĝi turnos sin per konformaj rezolucioj al la registaroj kaj vasta publiko.

Ankoraŭ unu karavano al Stockholm. Krom jam menciitaj de ni germana kaj preparata pola ekskurso sur pola ŝipo, Societo Franca Por Propagando de l' Esperanto interkonsente kun la Hispana Asocio kaj la Nederlanda Teritorio de UEA organizas oficialan karavanon al Stockholm, por la XXVI-a Unversala kongreso.

Radio-stacio dungis Esperantistan oficiston. La radiostacio de Brno (Ĉeĥoslovakio), kiu en la lastaj tempoj plurfoje aranĝis disaŭdiĝojn en la lingvo Esperanto, ĵus dungis novan oficiston, bone sciantan Esperanton, al kies taskoj apartenas ankaŭ la prizorgado de Esperanto - lingvaj disaŭdiĝoj kaj Esperanto - lingva korespondado kun la eksterlando. — La sama stacio okaze de novjaro dissendis dezirkartojn en Esperanto.

Radio-kursoj en 7 finlandaj stacioj. Ĉiumerkrede, depost 24 januaro, disaŭdiĝas sep finlandaj stacioj esperanto-

kurson je la 19.15 h. — La kurson okazigis la plebiscito de la aŭskultantoj; post la angla lingvo, Esperanto ricevis plej multe da voĉoj.

Konstantaj disaŭdigoj de Radio-Wien. Radio-Wien dissendas ĉiumerkrede vespere proksimume je 21-22 h. esperantlingvajn prelegojn, post kiuj oni prezentas aktualajn sciigojn pri la „Internacia konferenco“ en Vieno.

Esperanto en Britaj lernejoj. Lastatempe oni instruas Esperanton en 27 lernejoj en Anglujo. El ili 14 estas popolernejoj (oni instruas la lingvon oficiale en 8, neoficiale en 6 lernejoj). En 13 l'ceoj 5 havas oficialan, 8 neoficialan instruon (entute 351 geknaboj). — La tuto de la gelnantoj estas nuntempe 1006. La aĝo de la lernantoj estas plejofte 10—14 jaroj.

Antaŭkongreso en Oslo — 2—3 aŭgusto 1934. „Esperantobladet“ publikigas jenan alvokon, kiun ni prezentas resumete:

Fremdlandano — ĉu vi iam vizitis Norvegujon, tiun idealan turistlandon de Eŭropo? Ĉu vi vizitis Oslon, la ĉefurbon de Norvegujo? — Se jes, vi certe deziras reveni. Se ne, vi nun havas la okazon:

Ni invitas vin al antaŭkongreso en Oslo la 2-an kaj 3-an de aŭgusto 1934.

Multaj vidindaj lokoj atendas vin. Do — bonan revendon post la Universala en Stockholm!

Por detalaj informoj oni povas sin turni al Norvega Esperantista Ligo, Boks 388, Oslo.

Ankoraŭ pri la germana Kongres-Karavano. La germana karavano al Stockholm, aranĝata de Friedrich Ellersiek kun helpo de „Heroldo“ daŭros de la 30. VII. ĝis 13. VIII. 1934. La prvizoraj kostoj — ĉ. 160 RM.

„Bona libro estas bona amiko“ — bibliografia gazeto japana pri esperantlingvaj eldonaĵoj.

„Turismi Teataĵa“ — turisma estona gazeto an havas esperanto-paĝon. El ĝi ni ekscias, ke Estona Turisma Unuiĝo eldonis glumarkojn pri estonaj vidindaĵoj kun nur esperantlingvaj suskriboj.

Ekstremorienta Esperanto-Muzeo. La javaj esperantistoj komencis laboron por kolekti materialojn por fondota Ekstremorienta Esperanto-Muzeo.

NOVAJ GAZETOJ.

La verda lumo. Organo de Ŝanhaja Esperanto-Asocio. Redaktejo: S. E. A.

P. O. B. 1332 Ŝanhajo, Ĥinuĵo.

Franca Esperantisto Oficiala organo de la Societo Franca por Propagando de l' Esperanto. Redaktejo: Sekretariejo de la S. F. P. E. 59. Rue de Neuilly, Rosny — scuz — Bois (Seine).

Fidela uzanto de nia lingvo, la Lyon'a Foiro, preparante la propagandon por sia venonta kunveno (8.—18. marto 1934) ĵus eldonis novajn presaĵojn en esperanto, nome: afiŝojn, 70x100 cm., sorbpaperojn, ilustritajn poŝtkartojn kaj sigelmarkojn. Post unu monato, la Lyon'a Foiro plie dissendos presitajn invitletojn en Esperanto. Fine, la katalogo de ekspozantoj entenos, kiel kutime, esperantan tradukon de la ĉapitrotitoloj.

Kolekto de tiuj presaĵoj estos sendata al komercaj firmoj, delegitoj de U. E. A. kaj esperantistaj societoj, kiuj petos ilin.

Skribu al: S-ro Richard LEVIN, Propaganda Fakestro, Foire de Lyon, Rue Menestrier, LYON.



Adreso: Loka Kongresa Komitato de la XXVI-a Universala Kongreso, Fredsgatan 4, Stockholm.

Kotizo: Ordinara Kotizo — 25 sv. kr.; Ĝis la 31 marto — 20 sv. kr. Post la 1 julio — 30 sv. kr.; Junuloj — 5 sv. kr.

Filioj de Pola Esperanto-Asocio.

Pola Esperanto-Asocio malfermas — sur bazo de nova statuto, lege aprobita ĉe la Komisario de la ĉefurbo Warszawa — filiojn de sia Asocio en ĉiuj lokoj de Polujo, kie troviĝas minimume 10 esperantistoj aŭ simpatianoj, dezirantaj fondi filion. Korespondadon pri tiu afero bonvolu direkti senpere al la Centra Estraro de la Asocio je la adreso: Polska Towarzystwo Esperantystów, Warszawa, Aleja Jerozolimska 101.

REAPERRO DE POLA ESPERANTA GAZETARA INFORMILO.

Pola Esperanto-Asocio en Warszawa rekomencis la aperigon de la Gazetara Informilo, kiu sub ĝisnuna redakcio aperas de nun regule ĉiu-10 tage la 1, 10 kaj 20 de ĉiu monato. La unua numero de la kuranta jaro aperis sub la dato de 10 de februaro. La Komunikado estas dissendata al preskaŭ 150 gazetoj de Polujo. Interesuloj bonvolu interrilatiĝi senpere kun la Estraro de la Asocio, Warszawa, Aleja Jerozolimska 101, precipe tiuj, kiuj povas aperiĝi la Komunikado en gazetoj al ili pli bone konataj.

A V E R T O .

En komenco de januaro 1934 la Komitato de „Esperanta Semajno” en Varsovio donis rajtigojn kaj kvitancon al s-ro Józef Goldfarb, kiu devis kolektadi monon por korvi la sufiĉe grandan deficiton. La 26. I. 1934 (laŭ sciigo de mastrino, ĉe kiu li loĝis) li forlasis hejmon kaj ĝis nun ni scias pri li nenion. Li estas hungaro, pola civitano (laŭ lia rakonto), parolas hungaran, germanan,

LEONO VIENANO.

Gingua angulo

(Daŭrigo)

6) Kontakte kun la uzo de „ĉirkaŭ” en la Nr. 12 de „Pola Esperantisto” 1933 estas rimarkinde, ke „ĉirkaŭ” kiel prepozicio postulas post si ĉiam la nominativon. Rigardu la jenajn frazojn: I. La koncerto daŭris tri horojn. II. La koncerto daŭris ĉirkaŭ tri horoj. III. La koncerto daŭris ĉirkate tri horojn. — En la unua frazo sekvas la akuzativo post la verbo „daŭri”; en la dua frazo sekvas la nominativo post la prepozicio „ĉirkaŭ”, kiu paralizas la influon de la verbo „daŭri” altrudante sian potencon;

esperantan kaj ne tre bone polan lingvojn. Li estas mezalta, maldika nigra harulo kombita supren, portas okulvitrojn, proksimume 32—35-aĝa.

Ni tre petas samideanojn sciigi nin, kie li troviĝas, kaj ni rajtigas samtempe la delegitojn de UEA kaj prezidantojn de esperantaj societoj repreni de li niajn rajtigilojn kaj kvitancon.

Neniu pagu al li por nia deficino.

Jen teksto de nia rajtigilo: (tradukita esperanten el pola lingvo).

Varsovio, la 5-an de januaro 1934.

Tre Est. S-ro!

La Komitato de la „Semajno de Propagando de Esperanto” en Varsovio turnas sin al Est. S-ro kun afabla peto kovri parte la deficiton, kaŭzitan pro aranĝo de la „Semajno de Propagando de Esperanto” en Varsovio.

La deficino estas zł. 320.—.

La bilanco de la „Semajno de Propagando de Esperanto” estos sendita al Vi poste.

Estimplene

stampo (—) Semajno de Propagando de Esperanto

(—) subskribo de du Komitatoj.

P. S. Por enkasigi la monon estas rajtigita ano de la Komitato s-ro Józef Goldfarb.

stampo (—) Semajno de Propagando de Esperanto.

Adreso de la Komitato ĉe Vicdelegito de UEA: Halina Weinstein, Varsovio, Leszno 99/5.

Komitato

de „Semajno de propagando de Esperanto” en Varsovio.

Rimarko: ĉiuj esperantaj gazetoj estas petataj represi.

en la tria frazo ekhavas la prepozicio „ĉirkaŭ” formon de adverbo (= ĉirkate), kies influo sur la kazon de l' substantivo estas nula kaj tiam 'a verbo „daŭri” reakiras sian regpovon.

7) „Dum daŭro de kelkaj horoj” — tiu ĉi formo svarmanta ĉe famaj esperantistoj (sed ne klasikaj stilistoj) estas evitinda. Ĉe Zamenhof vi neniam trovos tiun formon, kiu estas tipa pleonasmo. La vorto „dum” enhavas laŭsignife per si mem la ideon de „daŭro”, tial uzu

ĉiam la klasikan esprimon „en la daŭro de...”

8) La kunmetaĵo „sendependa” kvankam ĝenerale uzata, estas tamen ne tute zorge formita. La prefikso „sen” povas esti uzata nur antaŭ substantiva radiko, ekz. senhara, senhariĝi ks. „Dependa”, ne apartenante al la mencita vortoklaso, ekhavas „malĝustan aspekton” kun la pref. prep. „sen” kaj estigas al la sperta lingvouzanto malagrablan impreson, se li ne lasas sin kuntiri kun la reganta „vortregimo”, kies aŭtoritato estas ekster ĉia dubo.

Pro la sama kaŭzo estas preferinda la formo „maltaŭga” anst. „sentaŭga”, „maltaŭgulo” anst. „sentaŭgulo”.

La origino de ĉi tiuj strangaj formoj enestas en la germana lingvo rigarde al la vortoj: unabhangig, ungeduldig ks., kie la prefikso „un” asociiĝis kun „ohne” — „sen”.

9) La vorteton „ja” ne loku sur la komencon de la frazo, kvankam tio ne povas esti rigardata erara, tamen stili-

sto ĉiurilate „eleganta” preferas alŝovigi ĝin al la vorto, kiun ĝi pleje koncernas. Decidu mem, kiu el la sekvantaj frazoj estas pli eleganta: I. Li superŝutis ŝin per juveloj. Ja ŝi estis lia amatino. II. Li superŝutis ŝin per juveloj. Si estis ja lia amatino. — La dua vortordo estas ankau lauzamenhofa.

10) La vorteton „ĉi” aldonu al „tiu” „tie” kaj uzu ĝin sen „tiu”, „tie” nur kun adverbiaj formoj ekz. ĉi sube, ĉi foje, ĉi monate ks. Malkonsilinda estas la uzo de „ĉi” sen „tiu” antaŭ substantivo.

11) La prefikso „pri” estas lastatempe abunde uzata de la plej bonaj stilistoj. Ĝia deveno estas sendube **poilingva**: „pri la milito” — o wojnie, prilabori — opracować, priskribi — opisać, prilumi — oświećlać. La verbo kunmetaĵa kun „pri” esprimas pli grandan amplekson kaj intensecon ol la simpla verbo aŭ tiu uzata kun alia prefikso.

Komparu: verŝi, surverŝi, subverŝi, ĉirkauverŝi kaj priverŝi.

POLLANDA KRONIKO.

Białystok. Nova kurso sub gvido de s-ro Droŝko komenciĝis en Zamenhofa Esperanto-Societo. — Dum la Ekspozicio de Libro en vojevoda palaco ĉe stando „Pola literaturo en aliaj lingvoj” estis montrataj ankaŭ la Esp. tradukoj de polaj literaturajoj.

Kraków. La 3-an de februaro okazis aranĝita de „Societo Esperanto” dancvesperoj, kiun honoris per sia vizito plej eminentaj esperantistoj. — El dancantoj distingis f-ino Irena Szczepańska, kiu ricevis kune kun s-ro K. Rouppert premion por plej bela valso; duan premion ricevis ges-roj: Schechterówna kaj Solariski, kaj f-ino Strumińska por sia stila vesto. — Dancvespero daŭris ĝis 3 matejre kaj la amuziĝinta publiko forlasis la salonojn nur dank’ al „decida (!) pozicio” de la servistaro. (E. Z.)

En „Societo Esperanto” okazis de post januaro k. j. la prelegoj de dir. I. Wiesenberger (Nova organiz. de U. E. A.), s-ano E. Lichtenstein (Konferenco en Wien, 20—24 de majo) kaj de s-ano Kutscher. La 23. 1. okazis „Plena Kunveno”, dum kiu oni preparolis la laborprogramon. La 29. 1. okazis „Koresponda Vespere” dum kiu oni tralegis kelkdek da leteroj el 12 landoj. La 8. 2. okazis „Diskuta Vespere”, kun partopreno de Univ. Profesoroj, je temo de

internacia helplingvo. Oni dissendis antaŭe enketon al ĉiuj Univers. prof. kaj aŭtoritatoj. Kurson gvidas Dro Dreher.

Mortis f-ino Zofja Tryhubczak, ano de Societo „Esperanto” en Kraków. Al la familio esprimas la plej profundan kunŝenton. **La Estraro.**

Lwów. Societo „Esperanto” aranĝis sukcesplenajn prelegvesperojn.

La 11. I. S-ano Lola Blankówna legis interesan propran novelon „La ŝtala koro”. La 15. I. Prezidanto Dr S. Fels pri vortefimologio Eperanta „temo” interesa kaj fervore pridiskulata.

La 29. I. Fino Minuska Mantel propran librencenzon „Kun la verda stelo ĉe Josef R. Scherer”. Kursojn kun multaj partoprenantoj gvidas s-anoj Laura Nadlówna, Lena Neumannowa-Frucht, Mgr. Kleinowa. Sub sperta gvido de kelkaj fervoruloj fondiĝis Esperanto kabaredo. Ĝin partoprenas per kanto, danco, deklamado s-anoj Mgr. Rena Silberówna, Leonja Neumanowa, Minuska Mantel, Grete Hahn, Nusia Pomerancówna, Lola Blankówna, Anka Gottliebówna, Sinjoroj Auster, Mann, Zieliński, Mgr. Jakob Hut.

Poznań. La anoncita antaŭe „ĉiujara karnavala vespero” okazis la 1-an de februaro en la ejo de poznanaj esperantistoj en la granda salono de la ka-

lejo „Faugrat“ ĉe la strato al. Marcin-kowskiego 8. La unua parto de la vespero ĝis la 21-a horo havis la karakteron literaturan. — La taskon de konferencanto plenumis dro Ŝluzar. — Inter la prelegoj oni substreku la prelegojn de sinj. prof. Jagmin, konata skulptisto kaj profesoro de la „Lernejo de la Ornamartoj“, de sinj. prof. Olszowski, sinj. juĝisto Adamski, sinj. advokato Scheffler kaj sinj. Ostrowski. — Je la 21-a horo la salono pleniĝis tiel per la partoprenantoj, ke oni estis devigata malfermi ankoraŭ la najbaran salonon por tiel fari pli grandan lokon por la amuziĝonta publiko. Fino Eker-tówna plenumis tre vigle sian taskon ornamante la ĉeestantojn per la grandaj verdaj steloj, kiuj aspektis tre bele. 5 min. post la 21-a kiam la tabloj, kiuj komence estis starigitaj meze en la salono formante la grandan literon **E** estis forigitaj kaj starigitaj apud la muroj — alvenis la orkestro de la „Fraterna Hel-po“ de la Poznana Universitato sub la gvidado de sinj. Sibilski kaj komenciĝis la plej gaja kaj laŭta parto de la vespero, kiu daŭris ĝis la mateno. — Oni kantis kaj deklamis en la paŭzoj inter la dancoj, sed la plej emociiga estis la momento, kiam oni elektis „Miss Esperanto“. La elektado estis sekreta. Fine dro Ŝluzar anoncis la verdiktan al la ĉeestantaro. Sinj. Helena Januszkiewiczówna estis elektata kiel „Miss Esperanto“ por la jaro 1934. La verdikto estis akceptita entuziasme de la ĉeestantaro, kies pruvo estis longedaŭraj frenezaj aplaŭdoj. Oni dancis tre multe kaj tre gaje. Distingiĝis dum la danco precipe sinj. prof. Jagmin, kiu malgraŭ siaj blankaj haroj montris neelcerpeblan humoron kaj junecon de la animo kaj koro.

La esperanta kurso en la supera komerca lernejo sub la gvidado de sinj. prof. Olszowski prosperas tre bone. Pli ol duono de la komenca nombro (80) de la partoprenantoj atingis ĝis la

mezo de la kurso. La aliaj, kiuj ne povis sufiĉe progresi, povos ankoraŭ partopreni en la sekvonta kurso, kiu komenciĝos post la somera libertempo.

Rogóžno. La 30. 12. 1933 mortis en aĝo de 78 jaroj malnova Esperantisto kaj dumviva membro de UEA Rudolf Maske. Li komence interesigis pri Volapük, poste dum la Kvara en Dresdono esperantistiĝis kaj ĉiam vigle interesigis pri Esperanto, batalante por homarana interkompreno.

Sosnowiec. En laborista klerigasocio fondiĝis la kurso por 12 geskoltoj. Gvidas s-ro Niedbał. 14. I. okaze de la festo pri disvolvo de skolta standardo oni dissendis esperantlingvajn salutojn al skoltaro en 15 landoj. — En antaŭurbo Pogoń oni komencis ĉiumarde babilvesperojn por kursofinintoj.

Warszawa. La 22. III. 1934 Esp. Sekcio de Pola Touring-Klubo aranĝas „Svedan Vesperon“ sub protektorato de sveda Ministro en Polujo Lia Ekselenco S-ro Einar Hennings. Samtempe estos malfermita internacia esperanta turisma ekspozicio. — Ni tre petas, ke samideanoj estu bonvolaj alsendi al ni interesan ekspozician materialon kiel eble plej baldaŭ je adreso: Esperanta Sekcio de Pola Touring-Klubo, str. Kredytowa 5, Varŝavo Polujo.

DE LA REDAKCIO.

Ni afable atentigas, ke ĉiujn presotaĵojn por la plej proksima n-ro de P. E. ni povas akcepti plej malfrue la 20-an de antaŭa monato.

La anoncita pasintmonate programo de Esp.-disaŭdigoj en polaj radiostacioj fariĝis ne aktuala koncerne la datojn. La prelegoj okazads dufoje ĉiumonate: la duan kaj kvaran merkredon je la 22 h. La prelegoj en marto okazos la 14-an kaj 28-an. La temoj estas tiuj, kiel anoncite en februaro.

Ni petas ĉiujn P. E. redakciojn kaj administraciojn interŝanĝi kun ni siajn eldonajojn po du ekzempleroj de ĉiu n-ro.

PRENUMERATA: rocznie zł. 8.—, półrocznie zł. 4.— Dla Towarzystw i grup esper. rocznie zł. 6.— Zagranicą: 5 fr. szw. Numer pojedynczy zł. 0.70. podwójny zł. 1.40.
OGŁOSZENIA: 1/2 strony zł. 30.— 1/4 strony zł. 15.— 1/8 strony zł. 10.— Korespondencja: małe ogłosz. z 10 słów (prócz adresu) zł. 1.—

ABONO: jare zł. 8.—, duonjare zł. 4.—. Por societoj kaj grupoj esperantistaj jare zł. 6.— Eksterlande 5 sv. fr. Aparta numero zł. 0.70 duobla zł. 1.40.

ANONCOJ: 1/2 paĝo zł. 30.— 1/4 paĝo zł. 15.— 1/8 paĝo zł. 10.— Korespondado: anonceto de 10 vortoj (krom adreso) zł. 1.—

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKÓW, LUBICZ 34. KONTO P. K. O. NR. 406.600